

La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Australasian Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penco aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 16. Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio. 10 Oktobro, 1921.

The Congress—and Afterwards.

Details of the discussions during the Prague Congress have not yet come to hand, but, as reported in the September "Suda Kruc," some important decisions were arrived at. In addition to the matters there referred to, the Australian delegate now reports that, on learning that the Esperanto Braille Journal was on the point of ceasing publication owing to financial difficulties, the Congress sympathetically considered the case, and appointed a committee to continue the publication for our blind samideanoj. Those present contributed liberally to a fund to be controlled by the committee. What was done regarding the vexed question of securing uniformity when writing names of countries will no doubt be the subject of an early report of the Lingva Komitato.

On the close of the congress 70 of those who had attended took train to Bratislava, which was reached on 7th August. After spending an enjoyable day with local Esperantists, the party boarded ship and travelled for 11½ hours on the beautiful Danube to Budapest. The post kongreso was very enjoyable. The local samideanoj arranged a concert, played two short dramas, had a concert and dance, and conducted the visitors to the Zoological Gardens, Royal Palace, and other show places.

On 11th August the party, now numbering only 30, reached Vienna, after a ten-hour journey. No doubt the weather suited our delegate, for it was 104 in the shade, being the hottest day in Vienna for the past 90 years. The three days spent with the Viennese Esperantists passed all too quickly. A local samideano owns the 200ft. wheel in the Pleasure Gardens, and gave the visiting Esperantists free rides.

The party—now only 20—then travelled to Italy, reaching Milan after a 26-hour journey. A day was spent in Milan, two days in Genoa, two in Pisa, two in Rome, two in Naples, and two in Florence. On reaching Venice the party had dwindled to eight, four of whom continued their journey to their homes in Denmark and three to Canada. Our delegate was now alone, but not a stranger in a strange land, for the delegate of U.E.A., S-ro Francesco Pizzi and S-ro D. Colussi rendered all necessary assistance. At the time of writing S-ro Hudson intended to remain in Venice for several days, and then to revisit Milan, which he had not had time to fully explore. From there he will go to Switzerland, and, possibly, to Finland. When one reviews the countries through which our delegate has travelled, and realises that in each he has, by means of Esperanto, been able to converse easily and familiarly with residents,

one rejoices over the benefits obtained by a knowledge of our **kara lingvo**, and wonders how much longer the shirt-sighted public will deny itself the same pleasures and privileges.

[In September issue, page 17, column 2, fourth line, instead of "5000," read "3000."]

Here and There.

Esperanto is well to the fore in the Formosan town of Taihoku. Classes are held every Monday, Wednesday, and Friday.

The fourteenth world congress of Esperantists will be held in Helsingfors, the capital of Finland.

A new group has been founded at Armentera, Spain. The mayor and clergyman of the district, as well as the editor of *Kataluna Esperantisto*, were among those present at the opening meeting.

Senator Henri La Fontaine, Belgium, twice winner of the Nobel Prize, in the course of a speech at the centenary celebration of the Peace Society, declared that Esperanto was the only suitable international language.

At the recent South Australian State Labour Conference a motion urging that Esperanto be taught in the State schools as soon as practicable was agreed to.

Kroniko.

Brisbano, Kv.—La loka grupo denove kunvenadas la unuan merkredon en ĉiu monato. Sinjoro Sycamore estis elektata komitatano de A.E.A.

Wellington, N.-Z.—Sinjoro Edman-son lastatempe respondis al informpetoj pri Esperanto el ĉiuj regionoj de Nov-Zelando. Li ankoraŭ laboras senlace inter la malliberuloj.

Carlton, V.—Ĉe la loka filio de la Aŭstraliaj Indiĝenoj Asocio, (Australian Natives' Association), sinjoro Redfern parolis pri Esperanto. Estis decidate starigi kurson, se iuj el la anoj deziras lerni.

Williamstown, V.—Sinjoro Redfern, ankaŭ klarigis nian aferon al la ĉi tiea filio, kiu konsistas el 500 anoj. La ĉeestantoj montris grandan intereson.

La lernejestro ĉe la altlernejo instruas Esperanton kiel laŭvolan temon al knabina klaso.

Education and Esperanto.

In Tokio 150 students of the First National College attended a meeting to hear addresses on the advantages of Esperanto. A class of 100 was formed. Two hundred students are learning Esperanto at the Tokyo Commercial University. Esperanto students at the Tokio Imperial University recently held a propaganda meeting, at which 350 persons attended. Three other educational institutions report classes. One has 80 members.

Two thousand boys and girls are learning Esperanto in the schools of Milan. About 1800 have shown in recent examinations that they have made satisfactory progress.

In Furth, Bavaria, 25 teachers are studying Esperanto. In that town Esperanto is a subject in the high schools. In Nurnberg, Germany, 10 postal and 92 railway officials are studying Esperanto. Classes are held in the rooms of the departmental buildings.

The Upper Commercial College, Wood Green, Eng., has a class of 10 students.

The Minister of Education, Czechoslovakia, has issued a circular to the masters of all second grade schools permitting and advising the teaching of Esperanto.

The head teacher of the Ararat (Victoria), State school is hopeful of forming a group among the teachers some of whom have expressed the willingness to learn.

La Fruktorica Maro.

Pioniro el la Nord-okcidenta parto de Aŭstralio vojaĝis al Melbourne por rakonti al lia moŝto, Lord Northcliffe, faktojn pri tiu nemulte konata regiono. Interalie la vizitanto diris ke la apuda maro enhavas pli da riĉoj ol la orminejoj. Bongustaj fiŝoj oni ne nombrigas, sed kalkulas je la tuno. Foje iuj personoj el vaporŝipo vespere remis al la marbordo por havigi al si fiŝojn por matenmanĝo. Estis lumilo en la boato, kaj dum la mallonga remado 18 dekdoujn da mangleblaj fiŝoj allogitaj de la lumo saltis en la boaton. Reirante, estis necese remi en senlumeco!

U.E.A. Jarlibro, 1921.

Ĉi tiu jaro la U.E.A. Jarlibro havas amplekson da 198 paĝoj. Ĝi estas vera enciklopedio. Oni povas trovi en ĝi informojn pri Kronologio, Sezonoj, Luno, Eklipsoj, Kalendaro 1921, 1922, Hebrea Kalendaro, Mahometana Kalendaro, Ĉefaj monunuoj, Tablo de afranko de la ĉefaj landoj. Internaciaj poŝtaj tarifoj Esperantismo. Notindaj datoj. Esperantistaj organizaĵoj. Naciaj societoj. Fakaj societoj. Gazetoj Esperantistaj.

Statuto de U.E.A. Adresaro de la delegitaj (85 paĝoj) kaj esperantistaj grupoj. Adresaro de korespondemuloj (48 paĝoj).

Laŭ la antaŭparolo. "La informoj, kiujn ĝi enhavas, estas absolute fidindaj, ĉar ili estis senditaj al ni oficiale de niaj Delegitoj." Ankaŭ, "La karaktero pli esperantista de tiu ĉi eldono klariĝas per ĝojiga kresko de la nombro de lokoj kie U.E.A. estas reprezentata kaj per la korespondemo de niaj membroj."

La U.E.A. rajtas fieriĝi pri sia jarlibro, kaj, se ĉiu membro dum la nuna jaro povas varbi almenaŭ unu membron, la utileco de la asocio estos pli granda, ol ĉiam antaŭe.

Membro rajtas postuli servojn de delegitoj en ĉiuj partoj de la mondo, kaj, se li tion deziras, enpresigi sian nomon, senpage, en la fako pri korespondado. Ĉu ne estas devo de ĉiu Esperantisto aniĝi kun U.E.A. kaj tiamaniere ricevi la altvaloran jarlibron?

Kunveno de U.E.A. en Melburno.

La jara kunveno de U.E.A. havos lokon en vendredo 18an de novembro, je la naua p. t. m. ĉe "Hardware Club," 350 Little Collins-strato. Dum la pasinta jaro, sinjoro C. W. Ballard, farigis ĉefdelegito por Aŭstralio. Li ŝatus ricevi, antaŭ la kunveno, proponojn kaj konsilojn de la ceteraj Aŭstraliaj delegitoj, pri unuiĝo de fortoj kaj planoj por pli agema laboro en la estonteco.

Novaj Oficistoj de la A.E.A.

En la unua kunsido, la konsilantaro elektis la oficistojn por la nuna jaro. Ili estas:—Vic-Prezidanto, sinjoro A. R. Cohen; Sekretario, sinjoro G. Redfern; Helpa-sekretario, fraŭlino Worthington; Kasisto, sinjoro M. Cohen; Bibliotekisto, sinjoro C. Kelly. La balotado de la grupoj

por elekto de Prezidanto ankoraŭ ne kompletigas.

Recenzo.

Esperantista Dokumentaro. Kajero tridek unua. Dekdua Universala Kongreso. Prezo: 3 fr. Centra oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris.

Ĉi tiu volumo da 112 paĝoj enhavas pri la Haga Kongreso plenajn Preparajn Dokumentojn, oficialan protokolaron, aldonajn, nomojn de la kongresanoj, kaj raportojn de kunvenoj de specialistoj. Nenio nova, ĉar ni legis ĉion antaŭ monataj, sed sendube estis necese eldoni ĉi tiun volumon, kiel oficialan raporton de la kongreso.

Fundamenta Gramatiko de Esperanto de Doktoro D. C. Monti. Itala Katedro de Esperanto, Milan. Prezo ne montrita; sed oni reklamas ĝin je Liroj 2.50.

Tute en esperanto, ĉi tiu libreto taŭgas, kiel lernolibro en la manoj de lerta esperantisto, kiu scios profiti el ĝia bona logika arango, kaj povos eviti kelkajn nemultajn erarojn, kiujn enŝoviĝis.

U.E.A. oficiala jarlibro, 1921 (9a jaro). Vidu apartan artikolon.

Bes-a adresaro, Moravany, Bohemujo. Prezo: 1-50 Fr. sv.

Tria eldono. Enhavas nomojn de korespondemaj esperantistoj. Se memoro ne trompiĝas, ĉi tiu adresaro estis diskutata ĉe Praha, kaj ne tute aprobe, ĉar oni sentas ke ĝi konkuras kontraŭ la U.E.A. jarlibro. Ĉiokaze ĝi estas nura duoblaĵo de penoj.

Diagramo de la esperantaj kunrilataj vortoj de D-ro J. W. Goetz, aven. Rio Branco, 131, Rio de Janeiro. Poŝtkarto laŭvice prezentanta la diritajn vortojn per pinto de turniĝanta stelo.

ADRESARO

Ĉu vi ankoraŭ havas amikojn alilandajn?

The Adresaro of the Bohema Esperanto Servo has a large list of names of Esperantists in all countries.

Also

Esperanto Societies and Journals. All Esperantists should be registered in this Adresaro.

Register now for fourth edition for 1/-, or with copy of Adresaro for 1/6.

Just Arrived, Third Edition, 1/6.

From A. R. COHEN,

Box 1367, P.O., Melb.

Virina Voc'rajto.

Kvankam nuntempe preskaŭ ĉiuj landoj konfesas, ke virino estas vivanta kunulo, havanta sentojn, pensojn kaj ideojn krom la povo labori, kaj ne plu pensas pri ŝi kiel sklavinon, kiel ja faras sovaĝuloj, ankoraŭ malmultaj landoj donas al ŝi la rajton voĉdoni por la parlamento.

Ĉi tiun rajton jam havas la virinoj en la aŭstraliaj ŝtatoj.

Tie la problemoj de la virino en la politiko ja estas reala afero, sed en aliaj landoj, eĉ en progresema Francujo, ĝi estas nur projekto en la pensoj de kelkaj personoj.

Aŭstralio jam permesas, ke la virinoj ne nur voĉdoni sed ankaŭ fariĝi parlamentanoj. Estas, do, interese observi la rezultatojn en la politiko de ĉi tiu lando.

Ĉiu ŝtato el la ses havas sian propran parlamenton, kiu estas regata de la ŝtataj leĝoj. Estas ankaŭ la parlamento de la federaciitaj ŝtatoj, nomita, la Federacia Parlamento. Ĉi tiu parlamento estas starigita de post la jaro 1901; kaj la voĉrajto estas por viroj kaj virinoj tute egala.

Neniam la virina intereso pri la politiko estas tiom, kiom havas la viro, kvankam la balotado ne estas multe malpli ol tio de la viro.

Sajne, por la unuaj parlamentoj, la intereso ne estis granda aŭ inter viroj aŭ virinoj, ĉar, por la unua elektado en 1901, entute nur 55 procento el tiuj, kiuj rajtis voĉdoni uzis la rajton. En tiu jaro oni ne kalkulis la virinajn voĉdonojn aparte.

Por la proksima, en 1903, nur 50 procento voĉdonis, sed el la virinoj nur 43 procento kaj el la viroj 56 procento.

Por ĉiu parlamento la intereso, post tiam, pligrandiĝis kaj ankaŭ la voĉdonado, ĝis por la pasinta elektado, en 1919, la tuta procento estis 71, vira 76 virina 66.

Tio ĉi montras, ke la virinoj uzas la rajton proksimume 10 procente malpli ol la viroj.

Por la tri antaŭaj elektadoj estis eĉ pli da voĉdonoj ol en 1919; por la jaro 1917, 78 procento voĉdonis.

Ĝis nun neniu virino sukcesis gajni lokon en la federacia parlamento; dufoje iu penis en Viktorio sed malsukcesis, kvankam ŝi havis surprize grandan aron da subtenantoj kaj preskaŭ venkis.

Jam en la urbaj konsilantaroj, la

virino sukcesis, kaj antaŭ nelonge iu sinjorino estis elektita, kaj ŝi ja forte protektas la rajtojn de virinoj elektintoj.

Okcidenta Aŭstralio, la dua ŝtato doni la voĉrajton en 1889, havis la unuan parlamentaninon, fariĝis membro je la lasta elektado kaj proponis la respondon al la parolado de la vicreĝo.

Suda Aŭstralio estis la unua doni la rajton, en jaro 1894; tiam sekvis Nova Sud-Kimrujo en 1902. Tiamaniĝo en 1913. Kvinslando en 1905, kaj Viktorio en 1908.

Remarkinde estas, ke en Kvinslando la virina voĉdono estas pli granda ol en iu alia ŝtato, kaj ankaŭ la tuta intereso estas pli granda.

Por la lasta elektado, la tuta virina voĉdono estis 80 procento, vira 75; por la antaŭa, en 1915, tuta estis 88, vira 86, virina 90.

La plej granda agado de la virino estas en la organizaĵoj; kaj ĉiu partio penas varbi ŝin. Kelkaj el ili, kvankam ili vidas ke ŝi estas tre interesiĝinta pri la politiko kaj tre agema, kredas, ke la virino ne taŭgas kiel parlamentano. Ĉu tio estas aŭ ne, nun rajtas por ĉiu elektado, kaj ĉi kandidato sentas la forton de la virino.

Ŝi estas forta subtenanto kaj faras multon per vizitado por varbi subtenantojn ktp.

La espero estas, ke kiam ŝi sentos sian taŭgecon kaj eniros la parlamenton, ŝi povos agi senemoci kaj estos forta ilo kontraŭ internacia malamo kaj milito.

Grava Alvoko al la Izolituloj!

Sinjoro E. A. Pryke, Barraba, N.S.-K., skribas jene:—

"Dankante ĉiujn amikojn pro mia elekto al la Konsilantaro de A.E.A. mi deziras sciigi, ke mi elektigis precipe reprezenti la interesojn kaj dezirojn de la izolitaj Esperantistoj, disvastigataj tra Aŭstralazio. Por tiu celo mi forte deziras, ke ĉi sola membro de nia Asocio sendu al mi, senprokraste, sian plen-nomoran kupon kaj adreson kaj, laŭvole aĝon, kune kun iuj proponoj aŭ sugestioj, kiujn li deziras meti antaŭ la Konsilantaro. Mi intencas kompili Adresaron de la Izolituloj de A.E.A. kaj faros laŭeble krei fortan ligan de solidareco inter ili, por kiu mi plezure fariĝos la perilo. Skribu nun al mi."

EDGAR A. PRYKE.

Australia Koton.

La Aŭstralia Koton kultura asocio intencas kulturi kotonon grandakvante en Kvinslando, por provi la eblecojn de la industrio en tiu regiono.

Sinjoro W. S. Johnson, bone konata spertulo raportas ke granda areo de la apudmara parto de Aŭstralio estas tre taŭga por la kulturo de koton. La pluvfalo kaj klimato similas tiujn de la Amerika kulturejo; kaj grava estas la fakto ke, pro proksimeco al la ekvatoro, estos malpli risko de difektiĝo pro printempaj aŭ fruaj aŭtunaj frostoj. Certaj maŝinoj el Ameriko oni uzos por prilabori la iomlongan kotonon, kiun oni kreskados sur grandaj areoj dividotaj en farmobienoĵoj por apartaj familioj.

Jarkunveno de A.E.A.

La jarkunsido de A.E.A. okazis la 2an de septembro, ĉe 350 Little Collins-strato. Malfeliĉe, la granda salono estis rezervata por koncerto de alia societo, kaj nia kunveno devis havi lokon en iom malgranda salono.

Pro la foresto de la Prezidanto, (sinjoro Hyde), en Nov-Britujo, la Vic-Prezidanto, (sinjoro A. R. Cohen), prezidis. Li diris, ke la asocio bone progresis dum la pasinta jaro, kaj ĝi faris multon da laboro. La filiigitaj grupoj tre efike plugis sian sulkon per ofta publika propagando kaj senĉesa instruado inter la anoj.

La jara raporto kaj bilanco estis akceptataj.

Estis varma debato koncerne proponitajn ŝanĝojn en la konstitucio. Oni diskutis la aferon. Oni klarigis. Oni malkomprenis. Oni ree klarigis. Post la deka horo multaj anoj devas forlasi la kunvenon kaj tiuj restantaj prokrastis la kunsidon ĝis la sekvonta vendredo.

La dua kunveno decidis ne fari ian ŝanĝon en la regularoj. Estis akceptata la eksigo de sinjorino M. Purnell el la konsilantaro. La dankoj de la Asocio estis donataj al sinjoro Maurice Hyde por lia sindona laboro kiel Prezidanto kaj kiel Redaktoro de la Suda Krucio ĝis la tempo kiam li iris al siaj novaj devoj en Rabaul.

Instruisto: Kiam Karolo I. faris sian plej grandan eraron?

Intelegenta Lernanto: Kiam li perdis la kapon.

Sekigo de Ligno.

Laŭ la propono de la Viktorio Stata Ministraro, usona spertulo pri la seka forna metodo por prepari lignon por uzo, nun vizitas Aŭstralion. S-ro Tiemann, la spertulo, diras, ke la kutima tempo bezonata por sekigi, ekzemple, nigran juglandon, estas 2½ jaroj, sed per la forna metodo du ĝis tri monatoj sufiĉas. La forna procedo faras la lignon forta kaj kofera. Multaj lignoj sekigitaj laŭ la ordinara maniero dispeciĝas, ĉar ne estis regado super la cirkulado kaj malsekeco. La forna metodo permesas plenan kontrolon en tiu direkto, sekve la ligno fariĝas multe pli bona. La procedo de sinjoro Tiemann estas pruvita sukceso en Kanado, Hindujo, Suda Afriko kaj en Okcidenta Aŭstralio, kie ĝarao (jarrah) estas fornosekigita.

Al ĉiuj komercistoj, industriistoj kaj kolektantoj.

La brazila registaro decidis solene festi la centjaran datrevenon de la nacia sendependeco, efektivigante en Rio de Janeiro, dum la monatoj Septembro, Oktobro kaj Novembro 1922, grandegan Nacian Ekspozicion pri komerco, industrio, transportoj, kutimoj, k. t. p. La Ĝada Komitato de tiu ĉi Ekspozicio disdonos kaj dissendos, al ĉiuj kiuj ilin petos, fotografiaĵojn, poŝtkartojn, prospektojn kaj statistikajn informojn, kiel propagandon de la Ekspozicio kaj de la brazilaj produktaĵoj, naturaj belaĵoj k. t. p.

Jen estas do bonega okazo por montri la disvastigon de Esperanto tra la mondo.

Ĉiu, kiu deziras ricevi tiajn sendotaĵojn, tuj skribu en Esperanto al tiu Komitato petante ilin.

Adresu vian peton al: **Commissio executiva do centenário bibliotheca nacional, Rio de Janeiro — Brazilio.**

La reĝisoro:—Ni devas mallevi la kurtenon. La posedanto:—Kial? La reĝisoro:—Unu el la vivantaj statuoj singultas.

Poŝtoficisto estis luncanta kun amiko. La amiko proponis kafon. "Ne, dankon," respondis la poŝtoficisto, "mi neniam trinkas kafon meztage. Mi trovas, ke ĝi kaŭzas min resti veka dum la posttagmezo."

Gazetoj Ricevitaj.

Bizantio, (Konstantinopolo), Nova monata revuo. Tre bele presita sur bona papero. Redaktata en lingvoj esperanta, franca kaj greka. N-ro 1 enhavas interesajn artikolojn esperante pri medicinaj temoj, la Situacio de la Virino en la Oriento, kaj citaĵoj el Helena literaturo. La novveninto estas bela revuo kaj meritas subtenon. **Ĉeĥoslovaka Gazeto**, (kun Nova Eŭropo), Praha. Nova monata gazeto, en tagjurnalna formo, tute en Esperanto. N-roj 1, 2, kiuj eliris tuj antaŭ la kongreso, enhavas informojn, kiuj sendube estis tre utilaj al eksterlandaj vizitantoj al la dek-tria. Nova Eŭropo estas dediĉata al la intereso de la malgrandaj nacioj. **Esperanto Triumfonta**, n-ro 45. Plenaj raportoj pri la dek-tria ĝis la kvina kongres-tago. **Esperanta Finnlando**, n-ro 7. Artikolo pri reciproka interkonatigo de estonoj kaj finoj. **La Eklezia Revuo**, n-ro 12. Poemo — "L'Allegro," de Milton, laŭ traduko de Louise Briggs kaj "Pensoj de frato Laŭrenco," estas la ĉefaj legaĵoj. **Hungara Esperantisto**, n-ro 7-8. Tute en Esperanto. Estas priskribita la unua publika esperanta ekzameno en Budapeŝt. **Kataluna Esperantisto**, n-ro 8. La enhavo estas plejparte Esperanta. Interesaj poemo kaj prezaĵo el kataluna lingvo. **Katolika Mondo**, (Graz). Nova dusemajna gazeto. Celas esti vere katolika organo internacia. N-ro 1 klarigas, ke ĝi estas eldonata ĉar la plua daŭra eldono de *Espero* Katolika ne estos ebla. **L'Esperanto**, n-ro 6-7. Tradukaĵo, el Sienkiewicz. Artikoloj pri Dante kaj Garibaldi. **Progreso**, n-ro 7. Artikoloj pri Ĉeĥoslovakujo kaj Silezio. **Revuo Orienta**, n-roj 6, 7. Interesplenaj leteroj de Japanoj vizitantaj Eŭropon. Ni konstatas, ke niaj japanaj amikoj senlace laboradas por Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. **Verda Ombro**, n-ro 7. Citas la progresojn de Esperanto en Siberujo. **Verda Utopio**, n-ro 7-8. Scienca priskribo de Japana Magia Spegulo.

Kie Lernantoj Laboras.

Notinda estas ankaŭ la t.n. "Laboranta Lerneja Semajno," pri kies rezultatoj ek la Ligo de la Nacioj tre bone parolas. Dum ĝi 600,000 gelnormoj en tuta Bulgario estis devigataj lerni kaj tion ili tre ĝoje faris — stas labori... Tiel multaj lernejgardenoj estis aranĝataj, la lernejpurigataj. La lernantinoj ellaboris multajn brodaĵojn, el kies vendo estis pligrandigataj la monfondo por malriĉaj lernantoj. La laboraĵoj de infanoj estas altvalora. Sed la ideo ke la lernanto ne estas parazito kio povas labori, estas pli valora ol la mono. De nun la infanoj mem postulos tian semajnon, ĉar ili estas kontentaj je ĝi.

The Oldest Esperantist.

The oldest Esperantist is the Rev. John Anderson. He was born in 1791, so he is a centenarian. He learned Esperanto at the age of 70, so no one need consider himself too old to learn.

Spritaj'oj.

Vizitanto: Kiel progresas la nova kuiristino? — Dommastrino: Mi ne scias, ŝi ne lasis sian adreson.

Li: Estas nenio pli taŭga ol la vojaĝado, mi opinias, por elmonstru kio estas en viro. Ŝi: Ja, precipe se vi vaporsipo dum ventego.

Inter rabistoj. Post la ŝtelaatenco kontraŭ la domo de la legisto.

Unua domrabisto: Ĉu vi prenis ion? Dua domrabisto (malkontenta): Ne, la viraĉo, kiu loĝas ĉi tie estas legisto.

Unua domrabisto: Kia malbona ŝanco! Ĉu vi perdis ion?

WANTED AT ONCE!

More Subscribers to
La Suda Krucio.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio al la XIIIa Kongreso.

Tre Estimataj Samideanoj.—Mia unua, nia unua devo estas saluti la memoron de Rektoro Boirac, kiu dum multaj jaroj, kun plej granda sindono, kompetenteco kaj aŭtoritato, prezidis la Lingvan Komitaton kaj ĝian Akademion. Lin anstataŭigi ni ne povos, kaj mi nur tro bone komprenas, kiom multe mankas al mi, por lin sekvi, eĉ de malproksime. La eblon mi tamen faros kaj mi esperas, ke vi helpos al mi ne nur per via kritiko, sed ankaŭ per viaj konsiloj kaj per ĝentila, efektiva kunlaborado.

Permesu, ke unue mi resumu por vi la historion de niaj Lingvaj Institutucioj depost julio 1914 kaj ke, poste, mi proponu al via atento kelkajn rimarkojn pri nia nuna kaj estonta agado kaj pri la reorganizo de niaj Lingvaj Institutucioj. Tion ĉi tamen mi faros pli plene buŝe en nia Praha Kongreso ol tie ĉi skribe.

Por la kunvenoj de la Lingva Komitato dum la Pariza Kongreso (1914) la Akademio estis preparinta: 1-e Liston de internaciaj radikoj aprobitan de la L. K. 2-e Liston de komune uzataj vortoj aprobitan de la L. K. El tiuj du listoj konsistis la Dua Oficiala Aldono al "Universala Vortaro." La milito malebligis la eldonon kaj dissendon de tiu ĉi dokumento, kiu povis aperi nur en julio 1919.

Plie la Sekcio pri la Komuna Vortaro intencis eldoni la definitivajn korektojn de la eraraj tradukoj en la Universala Vortaro. . . .

La Akademio publikigos tiun ĉi liston ĉu aparte, se eble, ĉu kiam ĝi eldonos planan Radikaron kun tradukoj. (La netuŝebleco de l'U. V. restas kompreneble plena kaj ĝin oni ĉiam represos tian, kia ĝi estas. Sed necese estas montri al la naciaj vortaristoj, kiuj uzas la Planan Oficialan Radikaron, kiel fundamenton de siaj laboroj, la precizan nacilingvan signifon de ĉiu radikoj, por eviti erarojn en la Esperanto-naciaj vortaroj).

Tia estis la situacio, kiam eksplodis la mondmilito. Poste, dum preskaŭ kvin jaroj, nebla estis la facila internacia korespondado, nepre necesa por la Akademiaj laboroj. . . .

Necese estis do atendi pacience la finon de la milito kaj la eblecon interkonsiligi ree kun ĉiuj Akademianoj.

En majo 1919, S-ro G. Chavet sendis al ĉiuj Lingva-Komitatanaj cirkuleroj pri plilongigo de la povo de la komitatanoj kaj de la Akademianoj kaj, en oktobro 1919, post aprobo de la unua cirkulero, duan cirkuleron pri la elekto de ok novaj Akademianoj. . . .

Tuj post tiu ĉi elekto, . . . mi demandis la Akademianojn pri ilia opinio koncerne la uzadon de la sufikso -i por landnomoj. Ĉar la plimulto ĝin malaprobis, mi sendis al la gazetoj cirkuleron, esprimante per ĝi la Akademian malaprobacion kaj klarigante, kial tiu sufikso estus ankoraŭ teorie malakceptinda, eĉ se ĝi ne estus kontraŭa al la Fundamento.

En julio 1920, la Akademio elektis: Prezidanton: Prof. Th. Cart; Vic-Prezidantojn: S-rojn Mybs kaj Warden; Direktoron de la laboraj sekcioj: Gramatiko: S-ron Grabowski; Komuna Vortaro: S-ron Grosjean-Maupin; Scienca kaj teknika vortaro: D-ron Corret; Konkursoj kaj Premioj: S-ron Privat. . . .

Jam antaŭe, dum la Haga Kongreso, la tie ĉeestantaj malmultaj L. K-anoj estis esprimintaj la deziron, ke la Akademio ree esploru la demandon pri-i, kiel sufikso por la landnomoj, sed laŭregulan, oficialan petskribon pri tio ne ricevis tiam la Prezidanto. Aliparte, tute malkaŝe mi konfesos, ke . . . mi esperis, ke, fine, precipe post la Akademia Deklaracio, la konsilon de la Akamedio rilate al io ĉiuj volonte aŭskultos. Sed tio ne okazis, kaj, kvankam mi deziris eviti pri tiu ĉi speciala temo agitadon, kiu ŝajnis al mi vana kaj tempoperda, mi opiniis devo por mi, kiel Prezidanto, defendi kaj defendigi la vidpunkton de la Akademio. Mi do petis de D-ro Corret, Direktoro por la Teknika Vortaro, raporton pri-i, kiel sufikso por la landnomoj kaj, samtempe, noton de S-ro Grosjean-Maupin, Direktoro por la Komuna vortaro, pri la akuzativo, kiu ŝajnas al kelkaj esperantistoj vera, neutila komplikajo. Tiujn dokumentojn ricevis private la L. K-anoj.

(Daŭrigota).

"The Esperanto Guide."

Translation of the Exercises.

Exercise 21.—Apenau ŝi rimarkis tion, ŝi kriis al mi: "Nu ĉu vi pensas, ke mi ne vidis ĉion? Vi ploris; vi estas tute pala; konfesu, ke vi estas malsana." "Jes, mi estas," mi respondis al ŝi, "sed vi ne devus miri pri tio, ĉar hieraŭ mi apenaŭ povis stari." Ho, ĉielo, kion vi faras? Ĉu vi ne vidas, ke tiu knabo tute ne estas kulpa. Se li estus malgentila kaj obstina, mi komprenus vian demandon. La malgentilulo ne respondis la demandon. Kiam vi renkontis mian kuzon? Hieraŭ matene, kiam li revenis de la ĉaso. Kion vi faras tute sola, mia kara infano? Mi promenas kaj serĉas ranojn. La plej proksima arbaro estas plena de ili; vi devus iri tien. Jes, sed oni trovas tie serpentojn (or: sed estas serpentoj) ankaŭ, kaj mi tre timas ilin.

Exercise 39.—Venigu la kuraĉiston; mia frato sentas sin malsaneta, kaj mi timas, ke li malsaniĝos. Kiel vi malpurigis vian jakon? Iru purigi ĝin, rapide. Kie mi povas pendigi mian jakon por brosi ĝin? Lumigu la lampon; ĉu vi ne vidas, ke vi malbonigas viajn okulojn? La printempa suno fluidigis la neĝon kaj glacieron sur la montoj. Li parolas tian sensencaĵon, ke oni pensas, ke li infaniĝis. Ĉu li mortigis sin? Ne, sed tamen li ne mortis nature. Rigardante el fenestro sur la straton, li falis de la kvina etaĝo kaj tuj mortigis. La pluvo ĉesis. Ĉesigu viajn kriojn! Li komencu, kaj mi daŭrigos. La klarigo, kiun li donis, nur ridigis ilin.

Wanted to buy, (to complete collection), "Suda Kruc" No. 1 and No. 10-11. "E.J.C.," Box 1367, P.O., Elizabeth-st., Melbourne.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, danko:—W. D. Smith, 4/6; J. Fitzgerald, 4/6; Sino Dwyer, 4/6; M. Helm, 4/6; G. Watson, 4/6; Taylor, 4/6; P. Wyatt, 4/6; Holdensen, 4/6; H. Pudney, 4/6; Splivalo, 4/6; J. McKenna, 4/6; R. Bigelow, 1/-; "Pakeha," 1/-; Abbot, 1/-; E. J. Cox, 1/-; J. Rogers, 5/6; F. Paulsen, 5/-; F. T. Sling (Rabaul), £3; "Sennomo," (Rabaul) £5; G. Benson, 4/6; Miss Fraser, 4/6; H. Hilderbrandt, 4/6; Worthington, 4/6; H. Bay, 4/6; Vodanovich, 5/-; A. H. Slade, 4/6; J. F. Hills, 4/6; W. L. Edmans, 5/-; M. Trundle, 4/6; A. Henry, 4/6; J. Orr, 4/6; B. Szepessy, 1/-; S. Nolan, 6/-; A. Martin, 10/-; Ledger, 4/6; M. Smith, 4/6; G. C. Lingridge de Tourcey, 4/6; F. Ern

S-ro Edmundo J. Cox, 24 Illawarra Road, Hawthorn, Victoria, deziras korespondanton alilande. L. Pk. Ĉiam tuj respondos.

Deziras korespondi kun ĉiulanda samideanoj. S-ro S. I. Nolan, Ridgway-str: Wanganui, Nov-Zelando.

Sinjoro, kiu celas ricevi la ordonon de bonfarado, diras ke li savis vivon de multaj personoj.

"Kiel? oni demandis lin.

— Tre simple, li diris, mi estis kuracisto de mia dudeka jaro, nu mi estas sesdekjara kaj mi neniam ekzercis mian profesion."

La sekreto de bona sano estas manĝi bulbojn ĉiutage, sed la malfacilaĵo en la afero estas teni la sekreton.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.